



Pac batalantoj ĉiulandaj unuigu vin

AŬRORO

Tribuna Heroldo kaj centra oficiala monata organo de HOMAR-GVARDIO.

Posedanto kaj eldonanto: HOMAR-GVARDIO, Vizovice, Ĉeĥoslovakio. — Ĉefredaktoro: Steleculo-Hvězdenký, respondeca redaktoro: Alojzo Svoboda. — Presis: Strojil, Přerov.

Jaro 1945.

Vizovice, aŭgusto 1945.

Numero 1. Prezo K 3.—



L. Zamenhof

Genia la Majstro de l' arto
Nin benis per lingvo en starto.
Steleculo: »De utopio al Panteono«.



Por Aŭroro desegnis: Jar. Slaviková,
gimnaziano en Brno.

Heroe al Venko!

Steleculo-Hvězdenký.

»De »fina triumfo« proksimiĝas jam
hor Georgo Deŝkin: »Al celo«.

Post ses jaroj de panhitlerisma persekutado kaj turmentado, post ses jaroj de kruelaj tiranio kaj hegemonio de bruna reĝimo, kiu malpermesis

eĉ tian entute senkulpan kaj kulturen lingvon, kia estas nia plej kara Esperanto, ni ekradias per eldonado de nia centra presorgano AŬRORO de nia movado HOMAR-GVARDIO.

Sur la ruboj de fia panhitlerismo ni fiere hisis la standardon de nia antifasista esperantista movado. Eltutkore kaj ekzalte ni salutas kamaradon Generalisimon STALIN, heroajn Ruĝajn armeojn, komandanton de aliancanoj Eizenhoveer,

Angla-Amerikajn armeojn kaj same la batalintojn mortintajn sur la batalkampoj. Al iliaj parencoj ni esprimas sinceran kondolencon kun deziro, ke anstataŭ malĝoji kaj plori, ili prefere ĝoju pro la mortintaj herooj kaj kun soldatoj entuziasmiĝintaj socialisme revenontaj hejmen-viciĝadu al laboro por pli bona estonteco de la popoloj eĉ post oceano.

Ni povis jam en la majo eldoni nian gazeton, sed pro la aŭtodisciplino kaj aŭtokritiko, ni cedis kaj pacience ĝisatendis la permeson. Nia afero estis prokrastita. Pri ni babiladis kaŝitaj elementoj, ke ni ne havas bibliotekon kaj tradicion, kiel ili k. t. p. Estas vero, ke ni ne havas bibliotekon, sed ĉu ni ne havas tradicion? Esperantistaj organizoj de nia tendenco geniziĝis en la jaroj 1900 — 10 en malsamaj landoj, kies kamaradoj-pioniroj oferis eĉ siajn vivojn por tiu ĉi ideo, kiun ni nun jam libere daŭriĝas. Kaj se ni kolektos niajn librojn de niaj kamaradoj el malsamaj landoj, do poste ni havos ne nur propran bibliotekon, sed propran kaj valoran Internacian Muzeon.

Malgraŭ la miskompreno de multaj neŭtralaj Esperantistoj, kiuj provizore ne konceptas nian mision, ni estas uzopretaj trakti kun ili (kondiĉe, se ili intencos tutserioze aĝi kun ni) kaj ofertas niajn gazetservojn al iliaj kluboj por kunlaboro.

Gekamaradoj, samideanoj!

Nun suprenfaldu la manikojn, ĉar jam okazis tiu glora kaj ora Esperanto-epoko, kiun ni tiome arde sopiregis kaj en kiu ni nun libere laboras sur kulturkampoj por nia afero. Se en unua ĈSR neŭtraluloj gvidis Esperantomovadon kaj ni havis rajton sole silenti, do nun en nova ĈSR, en la komenco de socialisma epoko en mez-Eŭropo okazu pli juste. Por nia movado mi prepariĝadis dum tuta tiel nomata »protektorato«, ilegale ĝin fondis kaj dediĉis kaj dediĉas tre multege da tempo eĉ posedaĵon. Kaj se tion postulus eksterordinaraj cirkonstancoj, mi uzopretas oferi eĉ mian vivon por socialisma venko de Esperanto. Nia movado jam havas adeptojn preskaŭ en ĉiuj teritorioj en ĈSR kaj niaj kamaradoj eĉ eksterlande jam komencis labori niatendence. HOMAR-GVARDIO, kiel deklaras mem ĝia titolo, posedas la prerogativon estri, organizi kaj gvidi Esperanto-movadon ne nur en ĈSR, sed en la tuta mondo. Ni jam solvis la problemon por Esperantujo: kiu ajn Esperantisto aprobanta kaj konsentanta kun antifaŝista tendenco, povas fariĝi nia membro kaj same kluboj kaj societoj aliĝas al HOMAR-GVARDIO CENTRO EN Vizovice. La devo de pli kapabla estas instruadi malpli kapablan membron, ĵus tial en HOMAR-GVARDIO trovas sian hejmon sendiference ĉiuj gesamideanoj: laboristoj, kamparanoj, verkistoj, poetoj, artistoj, instruistoj, profesoroj, doktoroj, inĝenieroj, advokatoj kaj ĉiuj ceteraj. Nia programo estas firma kaj internacia: per Esperanto senlace kaj diligente labori por tutmonda paco. Garantion de tiu ĉi paco kaj venkon de Esperanto ni povas konkeri sole per unuecigitaj fortoj de la popoloj. Tial sendiference ni ĉiuj en la vicoj

de HOMAR-GVARDIO trans la barojn, malgraŭ memoferecoj, laboradu por tutmonda socialisma venko de Esperanto. Tiel ĉi per firma, kultura, tutmonda nia movado ni almenaŭ parte pagos nian ŝuldon al SOVET-UNIO por nia liberigo. Kion la neŭtraluloj ne kapablis liveri al ni, ĉi tion ni vivekzemple de SOVET-UNIO liveros al niaj karaj neŭtralaj kolegoj-pioniroj, por ke per servo kaj merito de HOMAR-GVARDIO Esperantujo fariĝu ĉarmega edeno por ĉiuj popoloj!

La 31 an de julio 1945.

La arto en la popola Demokratio

Jar. Melka, akad. pentristo, Praha.

En la konstruado de nova popola ŝtato gravan mision portas la arto. Tiu ĉi signifa strukturo de popola vivo, kiu devas esti, unu el radoj, kiujn ni devas plene ekturnigi, por ke nova, pli bona mondo, pri kiu tiom da generacioj batalis kaj kio kulminiĝis per venko en tiu ĉi kruela fazo de la batalo.

Novan, pli justan kaj pli feliĉan vivon ni konstruos kaj estas bezone, ke ĉiuj fortoj estu valorigitaj. El la maro da sango geneziĝas nova epoko de lumo, el nebulaj horizontoj elkreskas granda ideo, kiu celas praktike efektivigi tion, pri kio pasinte klopodadis revuloj kaj antaŭvidemaj utopiistoj. Naciismo, plej terura apero de la faŝismo kaj hitlerismo mortis post grandaj demonaj atakoj kaj grandegaj timegoj, kiujn la mondo ĝis nun ne vidis.


Tiun ĉi rezulton de burĝokapitalista opinio, en kiu estis koncetrigita tuta reakcio de monda bando de ekspluatistoj, el la lando kaj naskiĝtero ni elŝiros kaj detruos.

Ĉiu pensema homo klare vidis, kien falegiĝas ĉi tiu aro kaj kun ĝi ĉiuj alservistoj, kiuj en tiu ĉi malbenita tempo serĉis sian konjunkturen. Efektiva arto ne povis okupi sian postenon en tiu ĉi periodo.

Kulturaj laborantoj kaj belartistoj estas nun liberaj, ili devas malakcepti ĉiujn ombrojn, de longa pasinteco, de la okupo, de la kooperado kun sencela burĝaro. La mondon ne povas gvidi okcidento, kie en la urboj apud malpuraj stratoj kun malsataj loĝantoj, en aristokrataj domoj vivas lukso de rafinita kulturo por la snoboj. Ni celas sele al tendenco de orde evoluiĝantaj puraj urboj kun kulturdomoj kaj ripozejoj, kun legejoj kaj galerioj, kiujn ni devas konstruigi, kiel popolan posedaĵon, kie liberaj kaj liberece spirontaj artistoj povos verke esprimi cian riĉecon de kreiva animo, kies vivon ne sufokos korupto kaj protektado.

La artistoj apartenas al la popolo, ili kreos pri ĝi kaj por ĝi. La artistoj ne estos devigataj krei lascivajon por konsoli snobojn. La artistoj pro konsciigo de sia seriozeco devas krei honestajn vorkojn, ĉar pleje kontrolas la popolo mem kaj la konscienco devas al ili atesti, ke ilia penado estas bona.

REPREZENTANTOJ DE ALIANCANOJ
en postupima konferenco.



*Kamarado generalisimo Stalin,
Trumen — prezidanto de Usono,
Attlee — ministestro de Britanio,
Molotov — eksterlanda ministro de USSR,
Byrnes — eksterlanda ministro de Usono,
Bevin — angla ministro, Leahy
— admiralo de aliancanoj.*

LENIN MAGIE.



*La Aŭroro de l' regno reala
Trans la barojn nin logas al cel';
Pro l' gefratoj sub jugo ŝakala,
Ni oferu de l' vivo la ĉel'...*

*La hienoj, de l' nigro, de l' bruno,
la martirojn aĉgvidis je kol',
Sklavigitaj popoloj, pro l' puno,
Lamentadis en kaptej' sen vol'...*

*Revoluci' transformas l' aspekton
De la mondo marksiste per Ruĝ';
La faŝistojn sekvantaj l' aĉekton
Ni repaĝu, masakru en muĝ'...*

*La burĝaro defendas sin vane,
Ĝin jam helpas nek milit, nek pac';
Nure Lenin magie vivsane
La naciojn protektas en spac'...*

*Glora lando, Sovetuj' unika
Venkoflagojn vichisas kun don',
Ĝin amase interes' publika
Prav-adeptas pro l' ĝuo de l' bon'.*

*Pro triumfoj tutmondaj volonte
Ni konkorde procedu sur ter';
Venka signo validas elfonte
Sur standardoj de l' justec' kaj ver'...*

Lau pola armea melodio »Co za tuman po drodze sie zrywa« en la malliberejo en Zlín aŭtune 1944 verkis Edoardo Steleculo.

Abonpago K-15 ĝis la fino 1945.

Rusaj liberacanoj kaj kun ili ilia teoriisto Miĥalovski en sia romantismo, orientita france el jaro 1848 opiniis, ke rusa kamparano havas socialistan instinkton, kiu dum tempo renversos socian ordon. Ili kiel prutentuloj, speciale kredis en econ de rusa historio kaj malrespektis la ekzemplon de malbona okcidento.

Jen, granda VI. II. L E N I N, orientita markse, estis disĉiplo de Karlo Marks eĉ en tiu ideo, ke efektiva revolucio posiblas tiam, se la proletaro estas sufiĉe evoluigita. M. Gorki diris pri Lenin: »Li parolas mirege simple, en fera esprimo prononcanta logike, kiel hakilo«.

Ni scias, ke labore kaj signifafare de tiu ĉi gvidinto kaj fondinto de SOVET-UNIO, estis konstruita potenca soveta patrio, kiu al ni kaj Daŭrigota.

HONORON AL NIAJ MALJUNULOJ:

Centra Plenum-Komitato liveris honormembrecon de la Prezidio al plej maljunaj ĉi tiuj membroj:

Reiĥlová Běla, edzino de lernejestro, 1872, Náhod.

Janečka Arnošt, Esperanto-instruisto, 1873, M. O.-Vitkovice,

Uhrová-Křivancová F., instr. de lingvoj, 1874, Písek, Bohemio.

Hrubý Eustaĥ, pensiulo, 1874, Heřmanice, distr Frýdek,

Kavan Fran., komercisto, 1875, Plzeň II.

Prohazka Jul., lernejdirektoro, 1877, Rajhrad.

Ni deziras al ili multajn jarojn da feliĉa kaj kvieta vivo, ke ili ĝisvivu sukcesojn de Esperanto.

ANTAŬEN :

La sencon kaj mision de mia vivo mi realigas per decida kaj firma paŝo trans la ĝunglojn de la malbenoj kaj malhelpoj al mia destinita vivceto, por ke tutan mian vivon mi dediĉu fekundafare por pli bona estonteco de la homaro.

Steleculo ĉe la starigo de HOMAR-GVARDIO.

Al plua laboro

Karaj gesamideanoj.

La milito ĉesis. Esperanto travitis unuan mondmiliton kaj nun eĉ la duan. Spite al ĉiuj penoj de la hitlerismo, kiu celis al absoluta pereigo de ĉio, kio portis almenaŭ ian signon de internacieco, venkis la lumo. La kaŭzon, ke nia kara lingvo sukcesis trabatali tiun malfacilan tempon, ni vidu en la fakto, ke ideo de Esperanto estis kaj restis firme konservata en la koroj de Esperantistaro. Por nia movaĉo okazis vere glora epoko, ĉar nia lingvo iĝos bona interpretisto por la nacioj; kiel rapida interkomprenigilo des pli, ĉar la rusa registaro favoras Esperanton.

Ni do kuraĝe ekmarŝu al laboro. En komenco nia laboro ne estos facila, ĉar ankaŭ niaj vicaj dum la militdaŭro maldensiĝis kaj preskaŭ ĉie ni havas dolorajn perdojn. Tamen ni estu certaj, ke nia laboro iĝos sukcesplena, se ni firme sekvos la devizon de nia Majstro Zamenhof:

»Paŝo post paŝo, post longa laboro ni atingos la celon en gloro«. Niaj esperantaj libroj kaŝitaj ie subtegmente, retroviĝis denove en niaj libroŝrankoj kaj ni ree ornamigis niajn surtutojn per signoj de espero. Ni do kreu nian programon.

Samideane via:

Šolc Karlo, insruisto de Esperanto,
Mladá Boleslav, 41/I.

Telkulturista fako

Redaktas: Johano Zeman, mastrumej-estro,
Meziříčko 44, p. Meřin, Ĉeĥoslovakio.

Karaj samprofesiaĵoj!

Certe vi ĝoje bonvenas nian »Telkulturistan fakon«, kiu intencas alportadi al vi ĉiam nur utilon kaj ĝojon, sed antaŭ ĉio ĝi celas servi al ĉiuj Esperantistoj-terkulturistoj.

Ni intencas publikigadi ĉi tie informojn, sciigojn, fakartikolojn kaj interesajojn por Esperantistoj-terkulturistoj. Ni petas legantojn, kiuj povas servi al tiu ĉi rubriko, ke ili sendadu al ni sciigojn, fakartikolojn kaj interesajojn el nia agrikultura vivo. Sendadu al ni nur vere valorajn kaj interesajn artikolojn, ĉar alie ni ne povos publikigi ilin.

Por ke ni havu almenaŭ partan supervidon pri nia telkulturista Esperantistaro, ni alvokas ĉiujn agrikulturistojn en Esperantujo al kunlaboro. Postulu kiel eble plej frue aliĝilojn de Homar Gvardio en Vizovice, por ke ni povu registri vin.

Ni esperas, ke vi komprenos nian pioniran laboron, kies celo estas unuigo kaj kreskado de niaj

terkulturistaj Esperantistoj en vicaj de HOMAR GWARDIO ne nur en nia renovigita Ĉeĥoslovakio, sed en tuta mondo. Ni ĝoje atendas vian kunlaboron.

VIVU ESPERANTO!

P. S.: Ĉiujn artikolojn kaj letorojn, koncertantajn ĉi tiun rubrikon sendadu al supra adreso.

KONSULOJ DE HOMAR-GVARDIO:

En malsamaj teritorioj en ĈSR ni jam havas niajn Konsulojn, kies misio estas reprezenti nian movadon kaj tutserioze servi senescepte al ĉiuj Esperantistoj, sendiference ĉu ili estas anoj aŭ de aliaj organizaĵoj Nomojn kaj lokojn de la Konsuloj ni baldaŭ anoncos en la gazeto. Pluaj samideanoj, kiuj bonvolus, al ni helpi en pionira laboro kaj volontus fariĝi Konsuloj, anoncu sin al
Homar-Gvardio, Vizovice.

Por Homar-Gvardia fondo donacis: Fondinto Edoardo Steleculo en Vizovice K 1000.—, Jozefo Svoboda, juna, Malenovice 221, Adalberto Řehák, komer., Zlín K 300.—. Novaj Trompetroj sekvu nin.

Al niaj legantoj. Pro la malgranda eldonkvanto, nun en la komenco unu ekzemplero kostas K 3.—. Pli malfrue, kiam disvastiĝos nia AŬRORO kaj fiksiĝos abonantaro povos kosti unu ekzemplero eĉ unu kronon.

Al Sovetrespublikara Esperantista Unio en Moskvo. Karaj gesamideanoj. Akceptu de ni entuziasman antifaŝistan kamaradecan saluton. Ni peŝas, ke vi nin subtenu per alsendo de artikoloj kaj poemoj por nia gazeto. Se vi havus esperantajn librojn, do ni ankaŭ bezonus ilin kaj estus dankemaj al vi. Ĉion sendu pere de via ambasadoro en Prago. — Gisvenke via: Steleculo.

Al niaj kamaradoj en eksterlando. Konsciiĝu aktualan nian devon: fondadu kaj organizu grupojn kaj sekciojn de Homar-Gvardio. Sendu al ni presmaterialon por la gazeto.

Redakcia Konsilantaro.

Korespondando

Anonco kostas 10 kronojn.

Smuĥ Karlo, laboristo, Mor. Ostrava, Ocelarska 9, Manĉik Francisko, razisto, Slavkov, Horni Nemĉi, distr. Uh. Hradište, Křivda Miloslao, studento, Zlín I, Zálesná VI, 1313, dez. kor, kun k-doĵ en Sovetio, Jugoslavio kaj Anglio.

Juj Esperantistoj trompis nin. Por gajni plej grandan nombron da membroj kaj abonanoj ni dum dissendado de aliĝiloj sendis ilin ankaŭ al germanaj Esperantistoj, sed bedaŭrinde ni estis trompitaj, rice vinte jenajn sciigojn: El Kladno: »Samideano Kreibich, kiel furioza naciisto kaj SS estas malbenita kaj oni lin kruele juĝos pro liaj malbonaĵoj, Nenion plu sendu al li.« Kaj el Prostejov pri eldoninto kaj redaktoro de la Liĝilo, Haikenwelder, ni ricevis jenon: »Haikenwelder estas arestita kiel germano.«

